

TEA-BULTENO

3^a JARO






SEPTEMBRO 2000

NUMERO 9



AGENDO



- 1 V Muzik-programo, zorge de Anita
- 2 S
- 3 D
- 4 L
- 5 M Ree al labor': ordigo de la arkivo 
- 6 M
- 7 Ĵ
- 8 V Pri la 69^a Itala Kongreso en Bologna
- 9 S
- 10 D **Festo de Amikeco - Dreiländerecke** 
- 11 L
- 12 M Ordigo de la arkivo
- 13 M
- 14 Ĵ
- 15 V El Esperanta Gazetaro
- 16 S
- 17 D
- 18 L
- 19 M Ordigo de la arkivo 
- 20 M
- 21 Ĵ
- 22 V  **En Ptuj - Slovenio**
- 23 S
- 24 D
- 25 L
- 26 M Ordigo de la arkivo 
- 27 M
- 28 Ĵ
- 29 V Pri TRIESTE 2001
- 30 S

ATENTINDAJ PROGRAMOJ

Dimanĉon la 10^{an} de septembro

Festo de Amikeco ĉe Dreiländerecke

Geamikoj el la tri najbaraj landoj atendas vin sur montopinto de *Monte Forno*, por gaja kunestado kaj reala atestado, ke homoj pace deziras kunvivadi, ignorante ĉian ajn diferencon pri raso, etnio, religio, politika kredo, lingvo; kulturo ks.

Triesta esperantistaro, kune kun Martin Stuppig, atendas vin ĉe la telfera stacio apud Arnoldstein, ekde la 9^a horo! Ne forgesu vian Alp-Adrian T-ĉemizon kaj - ĉefe - komfortajn ŝuojn!

Sinanoncojn por kuna forvojaĝo atendas TEA-sekretario, telefone - 040 763128 (marde kaj vendrede - 19.30-22.00) aŭ rete - esperanto@retecivica.trieste.it

12^a Alp-Adria Esperanto-Konferenco

SLOVENIA ESPERANTO-LIGO invitas vin al Ptuj, historioriča urbo, situanta en belega monteta regiono, por la tradicia Alp-Adria renkontiĝo de la 22^a ĝis la 24^a de septembro. Dum kaj post via restado vi profitu de la varma, termobaneja akvo, kies saniga efiko fortikigos vian korpon.

Ĉiujn detalojn vi povas ricevi de la TEA-kasisto.

La supraj informoj rilatas al la proksimaj okazaĵoj, sed en TEA-kaldrono bolas grandiozaĵoj: jes, denove pri la

70^a ITALA KONGRESO DE LA JARO 2001 EN TRIESTE!

Ĉu vi jam notis, ruĝkoloro kaj diklitere, la datojn sur la paĝoj de via agendo:

DE LA 28^a DE JULIO ĜIS LA 1^a DE AŬGUSTO?

Jam nun eblas aliĝi: tiel farante, vi pagos la plej malmultekostan kotizon. Jen kelkaj informoj: aliĝilon vi petu al *TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO* - CP 601 - IT-34100 Trieste Centro. Oni povas pagi per pĉk n^o 10834349 al TEA aŭ per pĉk n^o 37312204 al *ITALA ESPERANTO-FEDERACIO*. Sendante la aliĝilon, nepre vi aldonu la pag-atestilon. Ĉi-sube la listo de la diversaj kotiz-kategorioj:

- A Membro de Itala Esperanto-Federacio - IEF
- B Ne membro de IEF
- C1 Familiano, membro de IEF
- C2 Familiano, ne IEF-membro
- D1 Junulo (ĝis 25 jaroj), membro de IEF
- D2 Junulo (ĝis 25 jaroj), ne IEF-membro
- E1 Handikapulo, membro de IEF
- E2 Handikapulo, ne IEF-membro
- F Eksterlandano

Ne prokrastu ĝis morgaŭ, ĉion vi povas fari hodiaŭ.

El PROVERBARO ESPERANTA

Kategorioj	Kotiz-periodoj	Ĝis 30/09/2000	Ĝis 31/01/2001
Kategorio A)		50.000 ITL 25.82 €	60.000 ITL 30.99 €
Kategorio B)		70.000 ITL 36.15 €	90.000 ITL 46.48 €
Kategorioj C1)-D1)-E1)		25.000 ITL 12.91 €	30.000 ITL 15.49 €
Kategorioj C2)-D2)-E2)		35.000 ITL 18.08 €	45.000 ITL 23.24 €
Kategorio F)		25.000 ITL 12.91 €	30.000 ITL 15.49 €

Pri la postaj kotiz-periodoj kaj aliaj detaloj, turnu vin al **LKK**, sed jam nun, hastu, ĉar la tempo fulme pasas kaj... vi riskas perdi ŝancon ŝpari monon, plej bone elspezeblan dum la kongreso por aĉeti belajn esperantaĵojn, frandi tipajn triestajn bongustaĵojn, ekskursi al vidindaj lokoj ktp ktp. Ni estas je via dispono kaj atendas viajn aliĝojn!

Voĉoj kaj pensoj dum kaj post la 85^a UK

Mesaĝo de d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof
al la 85^a UK de Esperanto

Saluton al vi, Estimataj Gesinjoroj, saluton al vi, Geamikoj, venintaj de tre diversaj, proksimaj kaj malproksimaj lokoj sur nia tergloblo, por kongresi, ĉe la sojlo de miljaroj, en la patrolando de popolo, ene de kiu la Iniciato de nia Lingvo serĉis iam siajn antikvajn originojn.

Vi venis kongresi al la patrolando de Abrahamo, de Jakobo, de Moseo kaj de Kristo, sed ankaŭ patrolando de Hillelo, teologo vivinta tie antaŭ ĝuste du miljaroj, filozofo kies ideoj inspiris iamajn antikvajn originojn.

Vi venis al la sankta lando de tri grandaj religioj, lando de Dio, «kiun ĉiuj malsame prezentas, sed ĉiuj egale en koro (Lin) sentas».

Vi alvenis tien en la Jaro de Kulturo de Paco, do, laŭ la difino de UNESKO, jaro de la kompreno, de la toleremo kaj de la solidareco inter la popoloj kaj inter iliaj kulturoj. Kulturo de Paco, signifanta kulturon de valoroj, de kondutoj, gvidantaj senperforte al universala justeco garanti-onta al ĉiu ajn la vivantan realecon de homaj rajtoj. Kulturo de Paco, kontraŭstaranta la minacon de pereco de la diverseco de nia spirita heredaĵo, kies postlason ni ŝuldas al la estontaj generacioj.

Vi venis por debati la rolon de la **Lingvo** ene de tiu **Kulturo de Paco**, debati la rolon de la **Lingvo** kiel vehiklo de la kultura diverseco, diverseco prezentanta substancan faktoron de la spirita riĉeco de la homaro. Vi venis por debati la rolon de la **Lingvo Neŭtrala**, lingvo ne ambicanta anstataŭi iun ajn lingvon nacian, ŝirmon de nacia kulturo, tamen, en ĝia rolo de **Lingvo Internacia**, kontribuanta al la kompreno kaj, pere de kompreno, al la toleremo de kulturo de la najbaro, **Lingvo** servanta tiamaniere la ĉefajn faktorojn de la **Kulturo de Paco**.

Ĉar nia **Lingvo Neŭtrala** portas en si implicate la **Zamenhofan** idealon de toleremo kaj de amikeco, de la

frateco interhoma.

La vortoj de lia **PREĜO SUB LA VERDA STANDARDO**:

...kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
antaŭen kun pacaj armiloj!
kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj,
ni ĉiuj de Di' estas filoj ...

sonas tie ĉi ankoraŭ pli forte.

En la nomo de la familianoj **Zamenhof** mi deziras al la 85^a Universala Kongreso de Esperanto plenan sukceson kaj fortan eĥon tra la mondo, hodiaŭ, same kiel hieraŭ, kulturon de paco soifanta.

El Ret-Info

Kongresa aŭkcio kun televido

Eĉ la plej fajraj popoldancoj en la Nacia Vespero ne ĉiam povas konkurenci kun la vervo kiun oni ĉiujare spertas en la kongresa aŭkcio.

El tiu en Tel-Avivo la virtuoza makleristo *Humphrey Tonkin* kreis spektaklon, kiu tiom similis al piroteknikaĵo, ke en la superplena salono ĝuis ĝin ankaŭ tiuj, cetere granda plimulto, kiuj ne partoprenis ĝin aĉetociele. Ĝi evidente surprizis ankaŭ la kamera-teamon de la Israela Televido kiu ĝin longatempe filmadis.

La ĉi-jara bona celo de la aŭkcio estis FONDAĴO AFRIKO, kiu ricevis, danke al la vendo de 59 diversaj objektoj, entute 4035 israelajn siklojn (€ 1090).



Plej multaj el la aŭkciaĵoj estis libroj. Tamen, la plej altajn prezojn atingis ne-libraj varoj: la honoro pro kongresnumero 1 de la Zagreba UK kostis 310

siklojn (€ 84) aldone al la aliĝkotizo; afiŝo de la ĉi-jara UK kun aŭtografoj de **LKK**-anoj 250 siklojn (€ 68) kaj folio kun glumarkoj de la neokazinta Tel-Aviva UK de 1967 kostis 160 siklojn (€ 43).

Inter la libroj, la plej altpreza estis la unua kaj sola volumo de **ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO: A-K** de Francisco Azorin (1955), kiun la gajninto ricevis por 190 sikloj (€ 51).

Ke malnoveco sola ne difinas la prezon, tion montris la interesiĝo pri la bindita jarkolekto 1954 de **ESPERANTO**, kies prezo en la konkuro inter pluraj kolekt-emuloj atingis 170 siklojn (€ 46). La **KONGRESA LIBRO DE STOKHOLMO** 1934 vendiĝis por kvarobla prezo (**ILS** 120, t.e. € 33) kompare kun tiu de la **ANTVERPEN** UK 1928, supozeble ne pro tio ke la unua estas tiom pli rara ol la dua, sed ĉar hazarde la ĉi-fojaj aĉetemuloj malhavis ĝin en sia kolekto.

La aŭkcia sekretariino *Michela Lipari* bone enkasigis ankaŭ por **HEBREA PROGRESO EN PALESTINO** el 1926 (**ILS** 150 = € 41), **ESPERANTISMAJ VERSAĴOJ** de Zamenhof k.a. (**ILS** 140 = € 38), **LA JUDA ŜTATO** de Herzl, jaro 1934 (**ILS** 130 = € 36), kaj **KOMPLETA GRAMATIKO KAJ VORTFARADO** de Fruictier, jaro 1930 (**ILS** 120 = € 33).

La plej malnova aŭkciaĵo, Literatura Aldono al **LINGVO INTERNACIA**, 1905, kostis 110 siklojn (€ 30), dum la preskaŭ same aĝa **ESPERANTA SINTAKSO** de Fruictier, jaro 1907, montriĝis unu el la malplej kostaj eroj: ĝia nova posedanto akiris ĝin por nuraj 30 sikloj (€ 8).

Informis: Ret-Info

La sprita prelego KIO KAJ KIU ESTAS JUDO de Josef Shemer, okazinta vendredon la 28^{an} de julio okaze de la 85^a Universala Kongreso en Tel-Avivo, inspiris al mi la jenajn pensojn.
06 08 2000

DRO.STRANGAAMO

Enamiĝo en Esperantujo

Ĉu ni estas konsciaj pri tio kio okazas, aŭ ĉu ne, antaŭ niaj okuloj estas disvolviĝanta granda revolucio kiu komplete ŝanĝos la vidpunkton pri la realo de ĉiuj homoj.

Eble ni povas kompari ĝin (riskante redukti ĝin) kun la kopernika revolucio kiu devigis homojn adopti heliocentran vidpunkton pri la mondo anstataŭ la geocentra.

Enormaj, malfacile mastreblaj, nekonsciaj energioj enrompas en la "kolektivajn" konscion de la homaro kaj ili skuas la pli-malpli rigidajn strukturojn kiuj ĝis nun regadis la homojn: tiamaniere eniras en krizon la tradiciaj institucioj: ŝtatoj, grandaj religioj, familio, kaj aldone la konceptoj pri popolo, pri etnio, ktp.

La mondo iĝas pli kaj pli globa vilaĝo; tago post tago la limoj ruinfalas.

Tiuj, kiuj ankoraŭ ne estas konsciaj pri tio, baldaŭ estos devigotaj agnoski ke temas pri la realigado de la sintezo de homaro, t.e. de ĝia unuiĝo:

- ne nur je fizika nivelo (por ekzemplo, la konkero de aliaj landoj pere de fero kaj fajro kiel faris la Romianoj);
- ne nur je emocia nivelo (por ekzemplo, la evangelizado de aliaj landoj fare de la Romkatolika Apostola Eklezio);
- ne nur je mensa nivelo (por ekzemplo, la kultura imperiismo kiu komenciĝis post la Itala Renesanco fare de la Eŭropaj Nacioj pere de koloniismo kaj kiu ankoraŭ daŭras precipe fare de Usono kaj de riĉaj nacioj);
- sed ankaŭ je spirita nivelo (finfine la paco inter la homoj!).

Post tiu ĉi ekkonscio, kreskanta nombro da homoj (ne nur iuj el ili, kiel por ekzemplo la esperantistoj) rezolute klopodos krei la kulturon de la tuta homaro, en kiu la lokaj kulturoj estas nur parto kaj en kiu ili povas pluvivi kiel parto en la tuto.

La analogio kun enamiĝo estas evidenta.

En la konscion de la enamiĝintoj enrompas fortegaj nekonsciaj energioj (Eros) kiuj puŝas 1/8-in klopodi por realigi la kuniĝon kun la amat(in)o je ĉiuj niveloj (kompreneble, la atingonta nivelo dependas de la ampleksiĝo de la konscio de la enamiĝintoj):

- je fizika nivelo, iĝante ununura korpo dum la seksrilato;
- je emocia nivelo, spertante la samajn pasion, emociojn, kaj sentojn;
- je mensa nivelo, celante al la realigado de la samaj "sonĝoj";
- je spirita nivelo, transcendente la (angoran) staton de individuo dum la atingado de la ekstazo (de la Logos), samtempe atingante almenaŭ por unu momento la pacon, la harmoniigon, la ĝojon.

Nu, en Esperantujo, la multnombraj vojoj por realigi la spiritan unuiĝon de homaro estas favorataj danke al la idealoj kiuj estas ĉe ĝiaj radikoj; unu el tiuj vojoj estas la enamiĝo.

Dum la esperantaj renkontiĝoj facile okazas, ke du uloj enamiĝas; verŝajne ili ne estas samlandanoj (laŭ tradicia senco); kaj verŝajne dum la realigado de ilia kuniĝo ili renkontos grandajn malfacilaĵojn (malproksimecon, politikajn barojn, diversecojn, ktp) kaj ili estos

devigataj inventi la rimedojn por superi tiujn malhelpojn tiamaniere kontribuante al la falo de la limoj, t.e. ili kontribuas al la spirita unuiĝo de homaro.

... kaj post la 56^a IJK

Hongkongo - la realiĝinta revo

Inter la junaj esperantistoj en Eŭropo ne tre multaj ĝojis, kiam Hongkongo invitis al la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso. Multaj timis pagi entute ĉirkaŭ 1000 eŭrojn por fine damaĝi la medion per interkontinenta flugo, suferi de varmega vetero kaj eventuale trovi nur malaltan lingvan nivelon ĉe niaj aziaj samideanoj.

Ankaŭ mi komence hezitis, sed pripensis, ke principe mi tre ŝatus iam vojaĝi al alia kontinento por konatiĝi kun aliaj homoj kaj kulturoj. Kaj kiamaniere tio povus esti pli bela ol en la etoso inter junaj esperantistoj?

Mia antaŭgojo kaj scivolo kreskis precipe, kiam en junio la Hongkonga LKK aperigis, en siaj ĉiam bele prizorgitaj retpaĝoj, la liston de la unuaj 160 aliĝintoj. Certe estos agrable eltrovi, kiaj homoj kaŝigas malantaŭ tiom da nekonataj, ekzotikaj nomoj...

«La vetero en Hongkongo - 26 gradoj kaj pluvo», anoncis la piloto en mia aviadilo el Frankfurto. Elirante de la flughaveno al la bushaltejo, mi sentis klimaton, kiun mi ĝis nun konis nur el la tropikaj domoj de botanikaj ĝardenoj. Sed tuj mi konkludis, ke estas facile elteni tiun ĉi klimaton. Bonŝance la pluvo estis nur pluveto. Sed pli gravaj estis miaj unuaj impresoj en la kongresejo: rapide mi konvinkiĝis, ke ankaŭ inter la aziaj IJK-anoj troviĝas sufiĉe da homoj, kun kiuj eblas bone, parte eĉ tre bone, interparoli en Esperanto.

Nia ejo - feria vilaĝo meze de la naturo - ideale taŭgis por gastigi IJKon. Ni trovis tie klimatizitajn kunvenejojn kaj dormoĉambrojn kaj multajn eblecojn por sportumi. Multaj azianoj ŝatis ludi tablotenison, badmintonon aŭ korbopilkon, dum ĉefe la eŭropanoj ne emis ekhavi ŝvitoplenan ĉemizon ene de du minutoj, sed preferis viziti la naĝejon, senpage kaj preskaŭ ekskluzive je nia dispono. Danke al tiu ĉi naĝejo kaj la vento, la vetero restis agrabla ankaŭ post la dua tago, kiam la pluvetoj ĉesis kaj la tagaj temperaturoj altiĝis ĝis eble 35 gradoj.

Meze de nia ejo troviĝis herbejo kun tegmentetoj kaj benkoj, kie tage kaj nokte eblis renkonti aliajn homojn, babilo, kanti, ludi ktp. Kaj la kompreniĝo funkciis pli bone ol mi atendis. Inter la ĉirkaŭ 200 kongresanoj el 24 landoj de ĉiuj 5 kontinentoj troviĝis 160 azianoj el Ĉinio, Hongkongo, Tajvano, Japanio, Koreio, Vjetnamio, Nepalo, Mongolio kaj Siberio, sed nur 30 eŭropanoj.

Foje mi aŭdis eldirojn kiel «Dankon pro via herbo» aŭ «Unu rando - du sistemoj», kiujn sperta eŭropa esperantisto tamen tuj komprenas (herbo = helpo, rando = lando). Sed mi ne rajtas moki pri tio - juna koreo atentigis min, ke ankaŭ mia germaneca «r» ne estas modela (bildkato = bildkarto, ondo = rondo).

Cetere, la tre simpla interkona ludo, ke oni sidas en cirklo kaj ripetas la nomojn de la aliaj, fariĝis tre amuza en tia vere interkultura IJK.

Ĝenerale tiu ĉi IJK meritas multe da laŭdo. Ŝajnas, ke la organizado funkciis tute glate; la programo estis sufiĉe abunda kaj interesa, kaj eĉ la tuttaga ekskurso al la centro de Hongkongo valoris, malgraŭ antaŭa skeptikeco ĉe la

eŭropanoj, sian pli ol 50-eŭran kotizon. (Ni vizitis la plej belajn lokojn de la urbo kaj la Oceanan Parkon.)

Kun granda kontenteco mi konstatis ankaŭ, kiom da bongustaj vegetaraj manĝoj el legomoj, fungoj, tofuo, nuksoj ktp. ĉinoj kapablas kuiri.

Por preskaŭ ĉiu IJK-ano la partopreno en la Kongreso postulis grandajn elspezojn. Multaj ĉinoj devis pagi, krom la IJK-kotizo, ankaŭ restadon en hotelo, kiun ili fakte tute ne vizitis, nur por akiri enirpermeson al Hongkongo. «Estas facile por ni iri al Rusio, sed estas malfacile iri al Hongkongo.» klarigis al mi juna ĉinino. Sed verŝajne, pro tiuj ĉi altaj kostoj, partoprenis en la IJK ĉefe homoj, kiuj tre ŝatas Esperanton.

Videblis multe da entuziasmo - kaj multaj verdaj flagoj. Specialan simpation akiris la vjetnama delegacio: 9 gejunuloj el Hanojo, kiuj emfazis en sia kunveno «Hanojo - via rendevuo», ke post jarcento kun 30 jaroj da milito ili deziras igi sian urban centro de paco. Ili tre ŝatus post kelkaj jaroj - kiuj estas ankoraŭ bezonataj por lingva spertiĝo - inviti UKon aŭ IJKon al sia lando. Ankaŭ juna afrikano el Niĝerio videble ĝojis, ke post multaj vanaj provoj akiri vizon por partopreni en eŭropaj IJKoj aŭ UKoj (kaj paginte pli ol 2000 USD por flugbileto al Hongkongo) finfine realiĝis lia revo esti kune kun esperantistoj el la tuta mondo.

Ŝajnas al mi, ke neniu pentas sian partoprenon, ĉar tiu ĉi IJK estigis multe da novaj amikecoj kaj vastigis ĉies horizontojn. Kiam antaŭ 14 jaroj mi eklernis Esperanton, malfermiĝis al mi nova, nekonata mondo. Kaj post mia partopreno en la Hongkonga IJK, tiu ĉi mondo ŝajnas al mi multe pli granda ol antaŭe.

Ulrich Matthias, Germanio (El Ret-Info)

Por ne forgesi lingvoscion

Longtempe dezirata revo fine ektrovis ian vojon al realiĝo, kiam decembre de la pasinta jaro mi babiladis kun unu el miaj gelernantoj ĉe la koridoroj de la Lingvoinstituto NARWAL dum Esperanto-kurso, tie kadre de la projekto **INDIĜENAJ DIALOGOJ (ID)**. Li, s-ro Jebra Muchahary, direktoro de elementa lernejo en la ŝtato Assam (orienta Barato) invitis min instrui tie Esperanton.

Li tuj komprenis, ke reveninte de Nederlando post lernado de Esperanto, se li ne praktikas la lingvon, se li ne parolas, skribas, aktive uzas ĝin, li simple malpliigos siajn konojn iom post iom. Lia strategio estis, do, Esperantigi la lernejon, tiel, ke li havu ĉiuangule kun kiu uzi Esperanton!

La unua paŝo estu, do, instrui al la instruistaro tiel ke ili siaflanke poste daŭrigu la laboron kun la lernantaro.

Certe kun mikso de entuziasmo kaj la espero dissemi Esperanton ankaŭ en tiu mondoparto, mi planadis la alvenon al lia regiono.

La projekto estis elpensita tiel, ke mi kunvenigu la jam lernintojn de la 2 antaŭaj ID-kursoj, loĝantaj en Barato kaj Nepalo, por plueniri la vojon en nia lingvo kaj ke mi ĉefe instruu Esperanton al la stabo de la lernejo por tiel krei Esperanto-neston en Assam.

La lernejo de Jebra troviĝas en la malgranda vilaĝo Bijni, atingebla post plurhora veturado meze de fascina pejzaĝo, plena je verdo kaj spicita per la tre buntaj koloroj de la kamparanaj vestaĵoj. Ne granda distanco apartigas tiun vilaĝon de la landlimo al Butano.

La entuziasmo de la instruistaro de la lernejo St.

JOHN'S MISSION vere impresis min profunde. Plurhora instruado ĉiutage ne lacigis ilin. Male, ili estis ĉiam pli kaj pli avidaj kaj aktivaj, kiam ili paŝadis tra la gramatiko, kaj nura kanto kaj ritma dancado sufiĉis por refreŝigi la klasanojn.

Jam en la unua tago ili petis al mi, ke mi ne limigu mian instruadon al la lingvo Esperanto, sed ke mi pripa-rolu ankaŭ didaktikon kaj metodikon, ĉar se ili volas instrui la lingvon, ili akiru ankaŭ iajn bazojn por la prilingva instruado.

25 instruistoj, do, sekvis tian trejniĝon kaj nun ili kapablas komuniki en nia lingvo. Nia laboro inkluzivis eĉ tradukadon! Komence de la kurso, Lakhi, la instruistino pri muziko, por bonvenigi min, kantis ĉarman kanton en la boroa lingvo (la lingvo de la popolo tie loĝanta), dum kelkaj el la lernantoj dancadis ĝin. Min tre emociigis tiu ritmo kaj ĉiutage ni provis eltrovi la ĝustan tradukon kaj akordigi ĝin al la muziko de la origina verko. La kanto, "Eksidu, hej", estis kantita de ni ĉiuj dum la fermo de la kurso.

Certe granda laboro estas semi, inspiri, entuziasmi kaj tute alia estas plu konservi tian torĉon, kiam multaj aliaj okupoj kaj problemoj bezonas atenton. Tial, mi petas al vi, leganto, provu dediĉi momenton por skribi karton al ili, tio certe sentigos al ili, ke pliaj personoj en la mondo ja volas uzi, komuniki per Esperanto; se en via biblioteko estas kromaj ekzempleroj de iu E-libro, sendu al ili tiujn. Ili nepre bezonas ĉian helpon kaj subtenon de nia Esperanto-parolantaro!

Ĉi tiu vojaĝo estis mirinde inspira al mi kaj profunde dankas al ĉiuj instruistoj en **St. JOHN'S MISSION**, pro ties nelacigebla simpatio, pro tiom da entuziasmo en la lecionaj horoj kaj ĉefe por sentigi al mi, ke Esperanto ja utilas por venigi la mondon ankaŭ al tiom foraj lokoj kaj doni al ili esperon pri amikaj kaj pacaj kontaktoj.

Atilio Orellana Rojas - Rete: iei001@worldonline.nl

Korespondi deziras: pakistanaj klasoj

S-ro Muztar Abbasi, januare kaj februare, instruis la lingvon en du diversaj urboj. En la urbo Mirpur la kolegio estas nomita **ESP: KOLEGIO** kaj la vojo **ESP: ROAD**; ĉi tie kun la helpo de s-ro M. Ali Khizer pli ol 15 personoj lernis la lingvon. En la urbo Bhera (Sgh) du diversaj famaj institutoj aranĝis klasojn, unuafoje, per la valora helpo de ĉefestro de atlernejo, s-ro Lamaat Bugvi: 15 fraŭlinoj kaj 10 instruistoj lernis la lingvon. Ili ĉiuj volas korespondi tutmonde, speciale fraŭlinoj kun nur fraŭlinoj.

Ilia adreso estas

Bugvia Marryland High School

Berun Chak Gate, Bhera (Sgh) Pakistan.

Informis Amjad Butt amjadbutt@yahoo.com

Ĉiu, kiu volas skribi 1-4-paĝan artikolon en la temo "Kial mi estas esperantisto?" aŭ "Miaj travivaĵoj en Esperantio" por esti ero en artikolarolibro, kies aŭtoroj estas esperantistoj el diversaj landoj, kontaktu: Pekin Tenorio Vaz, Caixa Postal 182, **Br- 66017-970 Belem-PA, Brazilio.**

BULTENO de la membroj de

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@tiscalinet.it

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro-Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349